

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La 54a Zamenhof-Festo de Kanagawa

Posttagmeze en la 15-a de decembro 2024, en Jokohamo okazis la 54a Zamenhof-Festo de Kanagawa, en la halo nomata “Forum Minami-Oota”, partoprenita de 24 anoj, el kiuj 18 el Jokohamo. La indikitaj horoj laŭas al la realo, ne al la antaŭ prezentita programo.

● 12h30m: Komenco, kanto de “La Espero”, laŭ pian-ludo sur Jutubo. Estus pli bone, se ni provizus kantotekston papere, dorse de programera folio. Simpla sinprezento de la partoprenantoj.

● 12h45m: Japanlingva prelego de asociita profesoro Kamimura Kazumi, pri “Kiel Saito Hidekacu pensis pri la popolo kaj pri Esperanto”.

Saito Hidekacu (1908-1940) estis lingvo-konscia homo, aganta por la latiniga movado (nome, movado por ĉiutage uzi latinajn literojn anstataŭ la ĉinaj ideogramoj kaj kanaoj), kaj por Esperanto, sed enkarcerigita pro progresema pensmaniero en Japanio antaŭ la Dua Mondomilito. Pri tiu homo, Kamimura studis, kaj jam prezentis en faka kongreso en Honkongo en aŭgusto 2024. Ŝi japanigis la enhavon kaj parolis ĉi tie, uzante komputilajn bildojn, kie uzita estis Esperanto.

● 13h45m: Spekti DVD-on, nome monologan dramon “La Duonokulvitro”. Temas pri aktorado de originale esperanta samnoma fikcio verkita de Aŭgusto Boissac, aktorita de Colin Simmonds, en 14 minutoj. Temas pri viro pene metonta

duonokulvitron al sia okulo.

● 14h00m: Esperantlingva prelego de Kiyonaga Zyota, “Produktokvanto de polenaj grajnoj el natura arbaro ĉirkaŭ Takao-monto --- kiel bazo por rekonstrui antikvan vegetalaron per polen-analiza metodo”. Tio estas esperantigita versio de lia studo, kiun li panele publikigis en la lastajara novembro en faka prelegkunveno. Tiam li parolis, laborinta kiel profesiulo pri arboplantado en Tokio, sed jam emeritiĝinta, parolis kun “Esperanto Jokohama” kiel sia identeco, ĉar li ne apartenis al alia societo.

● 14h20m: prezentado de libroj, portitaj de JEI, kaj de Esperanto-Jokohamo, kaj poste ties vendado kaj ripozado.

● 15h10m: Prezento pri la Tanzania UK de Suzuki Keiichiro, vizitinta la UK-on. La kongreson mem kaj ekskursojn al naturaj parkoj.

● 15h50m: Prezento de la 3a Japana-Korea Komuna Kongreso, per jutubo, plus komentado de kelkaj el la partoprenintoj.

● 16h10m: Fermo

Poste, 6 personoj vizitis Esperanto-Muzeon Jokohaman, kiu situas ĉe Idogaya, proksime de la najbara stacidomo de la fervojo Keikyu.

Raportita de Sibayama Zyun'iti

La 133-a Legokunsido

En la 6a de decembro 2024 okazis la 133-a legokunsido por “Krokodilo” de Esperanta Ponto. Partoprenis 5.

“Krokodilo” fare de la grupo ‘Esperanta Ponto’

Sibayama Zyun’iti

Estas libro por surtablaj rolludoj kun simpla strukturo, verkita paralele, nome Esperante kaj japane. Sed por nia legokunsido, ni ne rolludis; simple tralegis kaj esprimis nian impreson. Tiel ankaŭ estas tiu ĉi eseo.

En la entreprenado de artefaritaj lingvoj, estas kontraŭstaraj opinioj, ĉu ni celu aŭ la ‘mondan uniformigitan lingvon’ aŭ ‘internacian helplingvon’ kun respekto al nia denaska, nacia lingvo. Kaj la ĉeĥflujo de esperantistoj estas je la helplingvo. Dume en la fikcia mondo aperis i.a. “1984” de George Orwell, malutopio kun uniformigita lingvo kaj de-ĉie-gvatata socio.

La mondo de tiu ĉi rakonto “Krokodilo” estas iasence de-ĉie-gvatata socio, tute supozebla de la nuna teknologio, plus la lando kun iel fin-venkinta Esperanto, nome ĉiuj kapablas je Esperanto, sed helpe de la moderna teknologio, nome pere de Al-maŝino nomata Verda Stelo. Tial, naciaj lingvoj vivas ankoraŭe. Sed tie aperas subtere aganta grupo infektita je ‘Krokodilo’.

Nu, la ĉefroluloj de la rakonto vojaĝas al amazona sekreta urbo, gardata i.a. de besto krokodilo, aŭskultas la opiniojn de la ‘Krokodilanoj’, kaj simpatias al ili, nome al la filozofio respektive al la diversaj naciaj kulturoj kaj lingvoj.

Entute, la rakonto ŝajne kondukas legantojn al la mondokoncepto, ke gravas diverseco de la kulturoj kaj lingvoj, jesante tamen al la utiligo de Esperanto kiel interlingvo. Mi tamen admiras la iniciatemon de la grupo Esperanta Ponto kaj ties subtenantoj, kiuj realigis tiun ĉi libron, efektive ludante ĉapitron post ĉapitro de la prarakonto antaŭ ol la publikigo.

Unu rimarkigon pri la japanlingva versio: en la rakonto ne estas klarigo, ke la nomo de la kontraŭ-registara grupo ‘クロコディーロ (Kurokodiŝiro)’, t.e. ‘Krokodilo’ devenas de la besto ‘わに (wani)’, t.e. ‘krokodilo’. Tial la kialo, ke ‘wani’ simpatias al ‘kurokodiŝiro’-grupo, ne estos tuj komprenata de neesperantistaj legantoj de la japanlingva flanko.

sezonvorto januara

Balonfiŝo フグ

Okita Kazumi

Balonfiŝo estas unu el la plej frandaj fiŝoj en Japanio. La plej bona sezono por manĝi ĝin estas vintro. Oni manĝas ĝin krude kiel saŝimo aŭ kuirinte kun legomoj k.a. en kaserolo.

Sed balonfiŝo havas tre fortan venenon en ovario k.a. kaj tial nur licencitaj kuiristoj estas permesataj kuirigi ĝin. Ili atenteme deprenas venenajn partojn de la fiŝo en la kuirado.

